

KOLEKTO DE LINGVO INTERNACIA



179

ABONYI ÁRPÁD



MALLUMAĴOJ

RAKONTO

EL HUNGARA LINGVO MALLONGIGE TRADUKIS

LENGYEL PÁL

—
DUA ELDONO
—

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, RUE LACÉPÈDE, 33

—
1907

Prezo : 60 centimoj

Donaco de

49/32



MALLUMAĴOJ



ABONYI ÁRPÁD




MALLUMAĴOJ

RAKONTO


EL HUNGARA LINGVO MALLONGIGE TRADUKIS

LENGYEL PÁL



PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, RUE LACÉPÈDE, 33

—
1907


708.941-B. Esp.
8, 2. Aŭfl.



MALLUMAĴOJ

— Kie estas Paŭlo?

— Ĉu mi scias?...

— He, nevino, vi estas...

— Kara onklo, mi petis de vi kvaronhoron. Vi estis kompleza donaci al mi tiun ĉi mallongan kvaronhoron el via kara tempo (la sinjorino akre akcentis la lastajn vortojn), mi do rajte postulas, ke vi aŭskultu min. Mi tuj finos.

— Kara, bela Lidio, — mi serioze diras, — tio, kion vi volas diri al mi, estas sensencaĵo. Vi jam diris tion al mi hieraŭ kaj antaŭhieraŭ. Mi ne aŭdis ĝin volonte. Mi serioze diras. Mia vespermanĝo... mia apetito... De la tempo, kiam mi venis ĉe vin, en tiua ĉi malgrandan vilaĝon, ĉie kaj ĉiam — mi serioze diras — mi vidas acidajn mienojn. Tio ĉi tedas, ĉagrenas min. Mi estas jam plena ĝis tie ĉi...

Kaj la estiminda kolonelo kolere montris sur sian orkolumitan kolon.

— Aŭskultu min, — interrompis la bela sinjorino senpacience, — poste mi ne incitos. Havu la bonecon, komenci la eksedziĝan proceson en mia nomo ĉe la juĝistaro, kiam vi estos reirinta en la urbon. Ne interrompu min. Mi volas tion. Mi volas, ke vi faru ĝin, por ke ĝi havu pli profundan impreson. Vi bone

konas min kaj Paŭlon. Vi estas mia onklo. Vi estis mia zorganto. Vi estas sola mia parenco, kiun mi povas konfidi. Vi plenumos mian peton, kaj mi esperas, ke vi ne malinstigos min je tiu paŝo, kiu — bedaŭrinde — nepre devos okazi.

— Sed, Lidio, mi serioze di...

La sinjorino maldolĉe ridetante faris rifuzan signon per sia brako.

— Mi ripetas, ĉia parolo estus senefika. Tiaspecan aferon oni ne analizu, oni akceptu ĝin senkondiĉe. Kion vi deziras ankoraŭ? Eble klarigojn? Vi ŝajnigas vin mireganta, kvazaŭ vi nenion sciis pri la afero, kvazaŭ vi ne sciis, kian vivon ni daŭrigas de ok jaroj, mia edzo kaj mi. Ha, la malluman ombron de tiu ĉi okjaro devas senti ĉiu homo, kiu enrigardas en miajn okulojn, al kiu Dio donis koron sentokapablan kaj okulojn vidokapablajn. Vidu min kaj Paŭlon...

— Nevino, vi estas ekscitita.

— Ĉu vi pensas? Ne timu, mi ne plendos al vi sentimentale. Iam mi plendis, malesperis, ploris. Rigardu min; mi estas trankvila, ĉu ne vere? Jen mia mano; mia pulso ja ne batadas pli rapide. Prenu ĝin, observu ĝin...

— Mi kredas, mi kredas.

La kolonelo stariĝis. Li estas grandataliulo. Liaj duongrizaj haroj estas zorge kombitaj maldekstren; liaj belaj, regulformaj lipharoj pinte disduigitaj. Bon-eksteraĵa, respektinda sinjoro, kiu jen ne scias kion respondi al la bela blankvangulino.

— Mi kredas. Sed, eble, vi povus pripensi...

— Mi havis sufiĉan tempon por la pripenso, de ok jaroj.

— Vere, mi serioze diras, tio ĉi estas vera... Sed eble vi povus repaciĝi?

— Ni ja ne koleras unu al la alia.

— Do, vi malamegas lin, aŭ...

— Ne, ni ne malamegas unu la alian.

— Je la malsankta diablo! kial do tiu ĉi stranga kvazaŭteatraĵo? Lasu min trankvila! Nek kolero, nek malamo, nek malamego, — kaj tamen eksedziĝon! Infero! pesto! — ne — pardonu, tiuj... tiuj ĉi aĵoj tute malrespektigas la decregulojn... tiuj ĉi aĵoj estas senencaĵoj!

— Povas esti.

— Mi ĝojas, ke vi konfesas ĝin.

— Volonte. Mi konfesos eĉ pli multe, se vi deziras. Tamen mi ne ŝanĝos mian decidon, kaj mi esperas, ke vi plenumos mian peton, kiun mi ne volas doni en fremdajn manojn.

— Kaj se mi rifuzus?

— Mi turnus min al mia advokato. Estas egale, ĉu vi, ĉu li, ĉu mi; tio neniel ŝanĝas la aferon. Mi volas liberigi Paŭlon, kaj mi tion faros. Mi estas teda al li kaj li al mi. Ni enuas unu la alian; en tio konsistas nia afero.

— Kredeble li estas la kaŭzinto?

— Ankaŭ li, ankaŭ mi. Ankaŭ Francisko Katolnai la Grizharulo. Sed unuavice *vi*, kiu tiel multe penadis por efektiviĝi nian malfeliĉan edzecon, por akiri al mi la Katolna'ajn bienegojn, la praan Katolnai-insignon, kaj... mi ne scias kion ankaŭ... Vi ja volis feliĉigi min! Senkulpigo simplataga. Feliĉigi! Mi estas feliĉa, mi dankas. Sed jam sufiĉas al mi la feliĉo!

— Vi ripročas min, kvankam mi devus riproĉi vin.

La kolonelo residiĝis kaj nerve klinadis siajn fortajn fingrojn.

— Mi... mi... Paŭlo estis ĉiam malĝojulo. Paŭlo estas efektiva sinjoro, sed li estas solema kaj troserioza. Vi, lia edzino, estus devinta elkonduki lin el liaj zorgegoj. Kaj kion vi faris? Vi fiere forturnis vin de li. Ho, ĝuste vi diris, sinjorino, mi bone konas vin, kaj mi bone konas la okazintaĵojn. Vi lasis vian edzon sola en la urbo, kaj vi iris en banlandojn, vi amuziĝis, vi petoladis, troe petoladis, kaj kiam sencerbaj dandoj vin demandis pri via edzo, vi estis akra, pika. Vi pikis Paŭlon per viaj vortoj, vi mokis lin, kaj vi kune ridis je li kun la dandaro, kiu ĉirkaŭzumis vin kiel muŝoj la sukeron. Tion ĉi vi faris sinjorino, kaj tamen nun, post ok jaroj, vi deziras la eksedziĝon.

— Vi estas lerta oratoro, kara onklo.

— Jes, mi estas; sed freneza — mi ne estas. Serĉu por vi alian taŭgulon, sinjorino.

— Ĉu vi rifuzas mian peton?

— Jes. Ni ne parolu plu pri ĝi.

— Bone. Mi do mem ekfaros. Kaj mi petas, kara onklo, ne koleru al Lidio, kiu ne estas malbonulino, sed malfeliĉulino.

Kaj la bela sinjorino apogis sian kapon al la brusto de l'kolonelo, kaj rigardis lin per ŝiaj bluaj, brilantaj okuloj.

— Ni ne disiĝu kun kolero.

— Mi ne koleras.

— Kiam vi forvojaĝos?

— Hodiaŭ.

Malsupre, en la korto de l'kastelo, Paŭlo dividis siajn ordonojn. Oni jungu je la luksa kaleŝo, oni alportu la necesajojn el la « blua salono ». La kaleŝon Stefano veturigu; ĝi veturu preter la arbaro, al la direkto de vilaĝo Krizba.

La lakeoj laboras diligente. Ili alportas la necesujon kaj palpebrumas sian mastron, kiu, kun kunplektitaj manoj, staras sur la ŝtuparo, kaj rigardas la laboradon rigide, senmove, kvazaŭ statuo senviva. Estas vere, ke Paŭlo Katolnai, kiu estas beltalia tridekjarulo, estas pezanima, malbonhumora. La vualita revo sidas sur liaj klaraj trajtoj, ia nepenetrebla nebulo, kiun nek rideto, nek favoro povas forpeli. Oni diras, ke ĉio tio ĉi estas pro senĝoja familia vivo. Kontraŭvola edziĝo, malfrua pento... Oni rakontas — eh! oni rakontas diversaĵojn, ĉiam kaj ĉie. Jes, ĉie. Ie naskiĝas ĉikano, ĝi enŝteliĝas en la spiron, en la koron, ĝi sidas sur la lipoj, ke oni ĝin blovu foren por ĉirkaŭirigi.

Paŭlo Katolnai elatendas la finiĝon de la laborado. — Oni rapidu. Tuj ekvesperiĝos; la ĉielo nebuliĝas super la altaj, neĝokovritaj montoj, kaj malvarma vento movas la foliaron de la arbaro. Ondumas la verda maro da folioj, kaj malklareta haladzaĵo kolektiĝas super la malseka kanaro.

Jen oni jam jungis la ĉevalojn. Stefano, la veturigisto, alveturigas la kaleŝon en regula arko antaŭ la ĉefan elirejon de la kastelo.

— Ni povas ekvojaĝi.

— Tuj, tuj.

Kiam Paŭlo eniras en la salonon, la maljuna sinjoro alkroĉis al si sian glavon. Li estas jam bonhumora. Li surmetas sian mantelon, kisas la sinjorinon,

rigardas tra la fenestro, antaŭdiras pluvon baldaŭan, premas la manon de la edzo kaj diras al Lidio:

— Serioze mi diras, ne faru...

Sed li ne atendas la respondon. Li eliras el la salono, sur la ŝtupoj forte tintigas siajn spronojn, sidiĝas en la kaleŝon, Stefano ekmarŝigas la ĉevalojn al lasante la kondukilon, — kaj post du minutoj ĝi jam veturas sur la vojo proksima al la arbaro.

Neniu diras al li « feliĉan vojaĝon ».

La edzo kun nevolonta ĝentileco kondukas reen sian edzinon, kaj en la salono per facilmova kapobalanceto li deziras al ŝi bonan nokton. Kiel ĉiam. Sed la sinjorino ne respondas same laŭ sia kutimo, sed mute ŝi proponas al li sidiĝi sur malgrandan sofon.

— Ĉu vi ordonas ion?

— Nur dum kelkaj momentoj mi intencas vin restigi, Paŭlo, se vi konsentas. Mi parolis kun la kolonelo, — ŝi daŭrigis seninterrompe, — kaj nia decido li trovis absurda.

— La decido ne estas la *nia*, ĉar ĝi ne estas la *mia*.

— Ho, ĉesigu. Ne amindumu, mi petas, sed estu sincera. Mi ankaŭ parolos malkaŝe kaj estas kaj estos sincera. Ni estas solaj, neniu aŭdas, neniu aŭskultas nin. Ĉu vi volas? Ni agu interkonsente, la unuan fojon de ok jaroj, kaj ambaŭ ni liberiĝos unu de la alia. Aŭdu, mi ne serĉas kompleksajn vortojn, vi ankaŭ ne serĉu tiajn. Nia edziĝo estiĝis pro volo de aliaj, kaj se ni estis tiel senzorgemaj obei tiun ordonon, ni ne estu malfortaj, sed fortaj nun, kiam ni intencas efektivigi la eksligitecon, nuligi la kunligon, kiu

doloras al ni ambaŭ, kiu fariĝis jam neelportebla por ni ambaŭ.

— Jen mi...

— Ne vi. Mi ne kulpigas vin, vi ankaŭ ne kulpigu min; tio estus vanaĵo. Mi volas. Mi volas, ke vi iru en la urbon, kaj tie, komencigu la eksedziĝan proceson, en la nomoj de ni ambaŭ. Ĉu vi volas?

Katolnai indiferekte ekmovis sian ŝultron.

— Nun? Kial?

— Prefere nun ol neniam, — respondis ŝi maltrankvile. — Mi ne povas jam toleri vian sekretemecon, la neŝaton, kiun vi nutras kontraŭ mi.

— Ne mi kaŭzis tion, Lidio. Iam mi alproksimiĝis al vi por fari sinceran konfeson, sed tiam... vi estis okupita per viaj balaj tualetoj. Kial do mi estus farinta perforte tian konfeson, kies indon vi ne estus kapablinta pesi, sed, kontraŭe, vi eĉ estus eble disiginta la malfortan ligon, kiu ankoraŭ kuntenis nin!

— Ha, vi tion kredas...

— Mi scias certe. Kaj nun?... nun ĉiaspeca konfeso estas jam superflua. Finita! Mia estinteco jam ne admonas per siaj mallumaj fingroj, — jam neniu kaj nenio plu povas forpeli la nigran ombron, kiu embuskas mian vivon...

— Fidu min, Paŭlo.

Katolnai neige skuis sian kapon.

— Finita, mi ripetas. Ni ĉesigu. — Morgaŭ mi vojaĝos en la urbon kaj tie mi agos laŭ via ordono.

— Ha! Vi do volas!

— Mi obeos, — respondis li, kaj kun facila kapmovo li deziris bonan nokton al sia edzino.

— Bonan nokton.

Kiam la sonoj de liaj paŝoj tra la larĝa koridoro finiĝis, Lidio ekscite desaltis de la sofo, kaj subite kaptante unu belan, artan florvazon, tiel forte ŝi ĵetis ĝin teren, ke ĝiaj ruboj tinte dissaltis sur la glata planko. Tremis ŝiaj malgrandaj manoj, ŝiaj arkaj brovoj kolere kuntiriĝis, kaj ŝiaj okuloj elradiigis pasion.

— Sekreto! eterna sekreto! Ofenda rifuzo! Hon-tigaĵo!... Sed, mi estas indiferenta; ĝi baldaŭ finiĝos; kaj poste...

La sinjorino rigardis la senfinan grizaĵon, kiu ĉie plenigis la ĉielon. Kio estas trans ĝi? Vi, misteraj demandoj, vi, minacantaj suspektoj en la aero, ne eks-citu tiun belan virinon, kiu jen ne scias kion fari. Varmego okupas ŝiajn fingropintojn, ŝian vangon, kaj ŝi ne povas bridi ilin. Jam longtempe ŝi suspektas en la malklareco, sed nur suspektas, nenion sciante... ĉu vere? ĉu ne vere?... ĉu Paŭlo amas iun?... Kaj kiun li amas?... kiun?

Ne, ne! Sensencaĵo estas tio! Amo? kaj Paŭlo! Neeble! Ĉu li povus nutri amon en sia koro, — li, kiu, ĝis nun, ne rimarkis eĉ la virinon en sia edzino?

Lidio, ĉe tiuj pensoj, sin turnis al la granda spe-gulo kaj longe rigardis sin en ĝi. Senmanka, dezirinda virino ŝi estas. La spegulo ja ne mensogas; ĝi montras la figuron tia, kia ĝi vere estas. Fidele ĝi montras ŝiajn rondajn ŝultrojn, belan talion, ŝian dolĉan, knabinecan vizaĝon, bluajn okulojn, kolon... ĉion, ĉion, kion ne scias rimarki sur ŝi tiu sencerbuloj.

Ho, Paŭlo, Paŭlo, vi...

Lakeo malfermas senbrue la pordon.

— Kion ci volas?

— Mi vidis ĝin, via sinjorina moŝto.

Ruze li palpebrumas, sekreteme, mallaŭte parolas. Lidio rapide ekkaptas lian manon.

— Nu?

— Mi vidis ĝin. Mi eĉ alportis ĝin al vi. Lia sinjora moŝto ne rimarkis mian agon. Unu portreto...

— Donu!

Portreto de virino ĝi estas. La sinjorino rapide ekrigardas ĝin, kaj la lakeo kontente movas sian vejnan, maldikan kolon.

— Parolu.

— Jes, vere. Lia sinjora moŝto longtempe rigardadis la portreton dum la vespero. Mi atentis, ke mi povu agi laŭ la ordono de via sinjorina moŝto...

— Daŭrigu, daŭrigu!

— Jes, jes. Lia sinjora moŝto profunde ĝemis, kvazaŭ li timus tiun portreton. Mi ne komprenas, sed tiel ŝajnis al mi. Nun li kuŝas sur la sofo. Li rigardas la lustron, li ne fumas, kvankam li ĉiam fumas en tiu ĉi horo. Jes. Mi...

La sinjorino donas monon al la lakeo kaj forsendas lin. Subite ŝi prenas la portreton. Tremas ŝiaj manoj, nerve tremas ŝia tuta korpo. Kaj ŝi rigardas ĝin... rigardas...

Rigida estas tiu vizaĝo, kaj klara kiel blanka ŝtono. La grandaj, nigraj okuloj ŝajnas esti sensentemaj, fieraj; tamen, ŝajnas ke, se vi profunde rigardas ilin, en vi, en la ĉirkaŭaĵo de via koro, io ekmoviĝas, — ŝajnas ke, se vi, eble, ĝin kirus, tiu rigida vizaĝo revarmiĝus, tiuj fieraj lipoj remoliĝus, ĝi varmigus, varmegigus pasie... eble...

Sed Lidio ne pensas tiel; ŝi vidas ĝin, ŝi vidas

nur ĝian formon kaj figuraĵon, kaj iam post iam malŝatego naskiĝas en ŝi kontraŭ la portreto.

— Vere, ŝi estas ridinda...

Tamen, ŝi ja ne ridas. La portreton ŝi demetas, kaj denove ŝi prenas ĝin. Kaj ŝi rigardas ĝin... rigardas...

— Kiu vi estas? Ekparolu. Diru, pro kio amas vin Paŭlo? Vi estas sorĉulino, ĵonglulino! Vi estas tiu! Vi estas malbela... abomena...

Lidio forĵetas la portreton, sed en la sekvanta momento ŝi reprenas ĝin. Kun akra atento ŝi esploras ĝin: ĉu la portretita virino estas edziniĝinta? Ne! La delikataj trajtoj sur la randoj de ŝiaj lipoj, la ŝajne indiferentaj okuloj, el kiuj elradiiĝas timemo kaj ankaŭ kuraĝo, ne povas esti proprecoj de virino edziniĝinta. Edzino ne ĵaluzas tiel forte sian amaton kiel knabino; kaj — mirinde — Lidio ellegas sovaĝan ĵaluzon el la okuloj. Digestantan flamon ŝi sentas kaj ekstremas ŝia tuta estaĵo. Kvazaŭ, de ie, alproksimiĝus kruela kondamno. Kvazaŭ malgrandaj, sangosopirantaj dentoj embuskus ŝin, kiuj tuj enmordas ŝiajn rondajn ŝultrojn...

Terurigite ŝi ekstremas.

Nenio, nenio! Nur la lakeo venis en la ĉambron. Lidio nerve krias al li:

— Foriru!

— Sinjorino, la kaleŝo venas returnen.

— La nia?

— Jes, la nia.

— Foriru.

Vere, la kaleŝo venis returnen, kun grandega rapideco. Ien ĝi jam alvenis en la larĝan korton, kaj en

la sekvinta minuto la kolonelo bruege kuras supren, du ŝtupojn trapaŝante po fojo. Io okazis... kio?

La servantoj kolektiĝas sur la korto kaj demandas pri la kaŭzo de l' reveno Stefanon, kiu indiferente movas siajn ŝultrojn kaj nenion volas scii. Li ne memoras, li nenion vidis, nenion aŭdis. Oni lasu lin trankvile, oni foriru de li al la diablo.

La maljuna oficiro rapidas al la ĉambro de Paŭlo kaj sencere monie li eniras ĝin:

— Ne miru! Mi estas... la kolonelo. Rapidu.

— Kio okazis?

— Rapidu! Prenu surtuton, kaj tuj venu. Unu knabino mortigis en la domo de l' kampogardisto, apud la arbaro. La kampogardisto haltigis la kaleŝon. La malsaĝa slovako, la idiotulo! apenaŭ mi komprenis lian balbuton. Unu knabino, kiu tenas vian portreton, viajn leterojn en siaj manoj. Rapidu! Vin ŝi deziras vidi; ŝia nomo estas Zoe.

— Potenca Dio!

Paŭlo ĝemege frapas sian frunton kaj subite ek-kaptas la ŝultrojn de la kolonelo. Mallaŭte, silabume li demandas:

— Kiel? la nomo... ŝia nomo?

— Zoe. Sed rapidu, mildiablo! La deziro de mortiganto estas sankta. Mi nenion komprenas el la okazintaĵoj, sed mi revenis por vi. Via portreto... viaj leteroj... Mi nenion komprenas. *Vi* scias! Rapidu!

Paŭlo elkuras senĉapele. Dum unu momento nere-koneble li ŝanĝiĝis. Li ne estas plu tiu sensentulo, trankvilulo. Lian vizaĝon superŝutas flamo de mistera ruĝo, kvazaŭ ŝtalaj risortoj movus ĉiujn liajn korperojn.

Preter la verando li renkontas sian edzinon. Li nenion diras al ŝi, eĉ ne salutas ŝin; sed kiam li ekrigardis la portreton en ŝiaj manoj, li kolerege suĉis siajn lipojn kaj malĝentile elkaptis ĝin el ŝiaj manoj.

Lidio surprizite paŝis posten.

— Paŭlo, — ŝi diris embarase, — kion vi faras?

— Kion? Ci forŝtelis ĝin! ci embuskas min?!

— Paŭlo, vi furiozas!

— Sinjorino!!

Ha! ŝi subite rektiĝis kaj malŝate rigardis lin.

— Kion vi deziras, sinjoro?

Sed tiujn ĉi vortojn Paŭlo jam ne aŭdis. Li kuris tra la ŝtupoj kaj en la korto li ensaltis en la kaleŝon.

— Ekmarŝigu!

Kaj Lidio, fiere, ofendite, kun maldolĉa malestimo montris al la kaleŝo rapidege ruliĝanta, dume ŝi turnis sin al la maljuna sinjoro:

— Jen la *edzo*, mia kara onklo.

* * *

Kaj nun, kara leganto, mi kondukas vin en vilaĝon *Krisba*, inter la slovakojn. *)

Pri tiuj slovakoj malmulte scias tiu parto de l' mondo, kiu kuŝas ekster la *Tátra* **); akompanu do min ĉiu, kiu ne abomeniĝas de la anima mallumo, ne

*) *Slovakio* (hungare : tót) : popolo dise loĝanta en kelkaj provincoj de norda Hungarujo. Simpla, malriĉa popolo. — Kvankam ili estas hungaraj regnantoj, multaj el ili ne parolas la hungaran lingvon. (La lingvo slovakaj estas slavida.)

***) *Tátra* : parto de Karpatoj, — la plej alta montaro de Hungarujo. (Rimarkoj de l'tradukinto.)

serĉas la belecon, sed kondolencas la mizeron vivantan super tiuj malfeliĉaj slovakoj de ilia lulilo ĝis ilia ĉerko.

Tie, kie la montoj etendiĝas al la ĉielo en kaprica senordeco, sub la serioza Tátra, vi vidas pajlotegmentajn dometojn, jen ruĝajn, jen bluajn, kun randohavaj, malgrandaj fenestroj. Rubmontetoj en la kortoj, — malgrasaj brutoj blekas en muskaj staloj, hundoj bojas malvolonte al la fremdulo, kiu ne povas eviti la trairon de tiu malpura vilaĝo, por iri en la kastelon Katolnai, kiun oni atingas nur post duontaga veturo. Hundo gardas la domon, kiam la mastro ne estas hejme, — hundo gardas ĝin, kiam la domanoj dormas. Kaj kiam iu pia hundo forvagas el la domo por serĉi pecon da ostoj: bretoj apogita antaŭ la enirpordo anstataŭas ĝin; ĝi ja klare signas, ke neniu estas en la domo.

Malsaĝegiga trankvileco regas en tiu vilaĝo. Ne pensadas tie eĉ la avara paroĥestro, Petro Chrasztek mem, kiu jam de dek ses jaroj loĝas en la kaduka pastrodomo, — kies plej granda zorgo estas la manĝo.

Ne estas vivo en tiu ĉi vilaĝo, nur unufoje en la jaro, dum la printempo, kiam oni vendas la virbovon de l' komunumo. Tio ĉiujare okazas, kaj oni aĉetas pli malkaran. La monon, kiu restas el ĝia prezo, la komunumanoj publike « fordrinkas ». Tiu tempo estas festo. Dum tiu tempo estas aŭdebla eĉ sovaĝa kanto anstataŭ la ĉiamaj unutonaj melodioj slovakaj, kaj oni povas senti flaron de rostita viando, anstataŭ la haladzon de kuiritaj terpomoj. Dum tiu tempo ankaŭ la pastro laboras: li predikas kun plenigita buŝo pri la modereco, kaj kelkajn brandoplenajn junulojn, kiuj kuraĝas ridegi, li senceremonie vangobatas.

Tiu gaja vivo daŭras unu semajnon. Poste — la terpomoj, brasiko reokupas sian lokon ; la pastro daŭrigas senlabore sian vivon, ĉar neniu aŭskultas de li la predikon pri la kondamno postmorta. La Krizba'anoj retranskviliĝas, repiiĝas.

Kiel mi jam diris, pri la Krizba'anoj malmulte scias tiu parto de l' mondo, kiu kuŝas ekster la Tatra. Nu, pri la pastroloĝejo ĝi absolute nenion scias. Nenion ĝi scias ankaŭ pri la pastro, kies biografion oni povus verki el guto da inko entenata de duono da kanaba grajno.

Mi eluzos tiun ĉi inkon, eltrempante ĝin el la kanaba grajno, por ke vi sciiĝu pri Petro Chrasztek, kiu estas fortulo, sanulo, plena je monavidaj inklinoj kaj ĉiaspecaj nehonestaĵoj. Li ne zorgas pri la paroĥo, li ĉiam disputas kun sia kuiristino, la maljuna Mario, insultante ŝin ; ĉiutage li batas Petkon *), la edukiton de l' mortinta sonorigisto ; sed plej malmulte li zorgas pri la Sankta Skribo, kiu estas por li nur negoco. Petro Chrasztek neniam pensas pro tio, ke li estas pastro, ke li havas majestajn devojn al Dio kaj al homoj. Li estas bedaŭrinda escepto. Li ne komprenas, ne plenumas la sanktan oficon de l' pastro ; li ne estas zorgema patro de la popolo, instruanto de nesciuloj, konsolanto de malesperantoj, disvastiganto de bono. Li estas nur homo, kiu elektis por si la profesion de pastro, por gajni la ĉiutagan panon.

La korto de la pastra loĝejo estas senorda, kvazaŭ iu ĵus estus enmigrinta en la loĝejon, ne havinta an-

*) *Petkó* : malkaresa formo de la baptonomo *Péter* (Petro).

koraŭ la tempon ordigi ĝin. Sed la disaj ruboj kaj la senordeco estas konstantaj tie ĉi. La loĝejanoj estas kutimintaj ilin, kiel la vilaĝanoj la mizeron. Tie ĉi legomoj, tie ostaj restaĵoj, super kiuj malsataj korvoj, paseroj kaj pigoj flirtas brue. Pajloj, disĵetitaj ligneroj, plugiloj, ĵus lavitaj tolaĵoj vidiĝas, kaj amaso da brikoj kuŝas ĉe la flanko de l' preĝejo.

Dum la tempo, kiun la paroĥestro tie ĉi pasigis, nur unufoje okazis bedaŭrindaĵo. Ia fremda oficiro volis sin rifuĝi el la strata koto, kaj, enrajdinte en la korton de l' pastra loĝejo, trovis, ke tie la koto estas ankoraŭ pli granda. Pro kolero li, stariĝinta sur la selo, komencis insultadi en ia stranga lingvo, minacante per sia vipo. La paroĥestro ruĝiĝis kaj kriegis al la oficiro en la sama lingvo. La oficiro subite eksilentis pro la miro, poste li kraĉis teren pro abomeno kaj forrajdis. Honto, honto!... La preĝejservanto, kiu konis iomete la germanan lingvon, rakontadis al la vilaĝanoj, ke la oficiro diris terurajn maldecaĵojn, sed lia pastra moŝto... fi! li superis la oficiron en la parolo...

Sed jen konsumiĝis la guto da inko entenita de duono da kanaba grajno. Ĉu vi volas aŭskulti ankoraŭ, kara leganto?

Petko, la edukito de la mortinta sonorigisto Matiaso Povan, ankaŭ similis al senanima ŝtupo. Ankaŭ tiu ĉi malsaĝa dekdujara bubo ne havis animon. Li estis nezorgita, maldika, malgrasa infano, sed li tamen konsciencie daŭrigis la « oficon » de lia edukinto, pro kio li ricevis iom da restantaj manĝaĵoj de la paroĥestro por ne morti de malsato.

Petko estis tamen ĉiam kontenta. Por li ĉio estis

bona; sed li ne estis kapabla raporti pri tio: kio estis bona en la pasinta kvaronhoro. Kaj liaj okuloj! Nenian homan econ vi povus ellegi el ili, — liaj okuloj ne estis « spegulo de l' animo »; ili ne elradiigis la varmon de l' animo, pri kio oni rekonas la homon, — sed la dubepalpantan instinkton, pri kio oni rekonas la bestidon.

Lia mastro, la paroĥestro, kelkfoje ŝajnis, kva-zaŭ li kompatus tiun malfeliĉan infanon, sed entute li ne zorgis pri li. Kial? Li ja estas homo, li do helpu sin! Se li ne estas kapabla helpi sin: kial perdi la tempon kaj penon por vana zorgado?

Petko ne estis kapabla diferencigi de la bono la malbonon. En nenia rilato. Al li estis egale, ĉu li manĝas trokuiritan karoton, ĉu luksebakitan anseridon. Al li estis egale: ĉu mizero, ĉu bonvivo; la unuan li ne komprenis, la duan li ne konis.

Lia plej amata okupiĝo estis la sonorigo. Kiam li sonorigis, li akompanis la batojn de l' sonorilo per balancoj de sia kapo.

Kiam iaj sonoj de l' meso tuŝis liajn orelojn, silente li klinis sian kapon, kunmetis siajn manojn kaj rapide murmuris la *Patro Nia'n*, poste li faris signon de l' kruco. « Dio — estas — potenca — — Dio — potenca — — potenca », li murmuris pie. Li okupis sin ĉiam pri la religio.

Post la finiĝo de l' meso li kisis la sonorilon kaj reiris hejmen. Li eniris en sian ĉambron similantan al porkostalo, kaj tie li dormis. En tiu nestego entenigis strangaj objektoj. Pentritaj paperoj, envolvintaj cikorion, kiujn la maljuna Mario forĵetis el la kuirejo; fereroj, koloraj rubanderoj kaj similaj. Ĉia-

specaj senutilaĵoj, kolektitaj en la korto kaj stratoj, kaj rivera sablo en rompita botelo...

... Okazis iam, ke la paroĥestro, sinjoro Petro Chrasztek, trovis malnovan kalendaron inter la libroj. Duonĉifita, flaviĝinta aĵo; sed — ĉar ĝi presita estis, — li komencis legi ĝin, por elĉerpi el ĝi eblan saturigon spiritan. Kaj jen, li legis el ĝi tre signifan artikolon pri la devoj de l' pastroj, kiuj « paŝtu sian ŝafaron » kaj instruu la nesciulojn.

La suno varmege brilis, papilioj flirtis de floro al floro, birdoj pepadis sur la arboj.

Dolĉa, bela mondo! Kiel belega estas la vivo! Kiel malfeliĉa estas, kiu ne sentas la vivoĝojon!

Jen Petko: li vere ne sentas la vivoĝojon. Li ne-nion sentas, li nur vivas kiel senkonscia estaĵo. Li estas materio tre oportuna, ĉar li estas nesciulo, ĉar li bezonas instruon. Kiel altastile diras la kalendaro: « Instruu la nesciulon je ĉio, kion vi lernis en via pli agrabla sorto... » Jes, ha! kia nobla entrepreno! La spirito, la koro, la bonmoró... ha! ho!... Kaj lia pastra moŝto entuziasmas.

Kaj la dankemo! Dankemo al la iama sonorigisto Matiaso Povan, kiu ĉiam admiris lin predikantan. Kiel li laŭdis liajn predikojn, laŭte, disanoncante! Estas vere, ke la mortinta sonorigisto estis sentaŭga, malsobra homo, sed bonkora. Kaj la koro estas ĉio, — la sincera, entuziasmema, kristanema, vera koro estas ĉio!

— Li ĉiam admiris min pro mia elokventeco... nu, — jes, vere, kaj li... li estis prava — nu, jes.

Do: la dankemo, kaj la kalendaro. Li batetis sian frunton per la fingroj, poste elkriis tra la fenestro:

— Alvenu, Petko! sidiĝu antaŭ mi, mia filo.

La pastro montris al li duonkadukan seĝon. Petko sidiĝis sur ĝian randon, preskaŭ senkonscie li rigardis la pastron, kiu stariĝis, karesis sian grasan mentonon, kaj mute, reve esploris lin.

— Hm... la animo dormas... ĝi profunde dormas. Poste li residiĝis sur la sofon.

— Diru al mi la *Patro Nia*'n.

La knabo faris signon de kruco kaj rapide murmuris la demanditan preĝon.

— Bone. Nun aŭskultu per cia tuta cerbo, ĉar mi intencas paroli al ci pri tre lernindaj aferoj. Sed antaŭe diru al mi: kion ci memoras el tiu parolo, kiun ci jam aŭdis de mi?

La knabo skuetis sian kapon kaj silentis. Li ne-nion memoris, — li nur timis, ke li ricevos la laŭkutimajn batojn de la pastro.

— Mia filo, ci ĉion forgesis. Malbona signo, malbona.

— Malbona, — rediris la knabo maŝineme.

— Tre malbona. Sed ekzistas senkulpigo por ci, jes, ekzistas. Ci estas malinteligenta, mia filo, kaj mi kompatas al ci. Aŭskultu nun: diru al mi, kiu ci estas?

— Petko.

— Kiu kreis cin?

— Dio.

— Ĉu ekzistas paradizo?

— Jes. Dio — estas — potenca — — Dio — potenca — — potenca — —

La pastro kontente movis sian kapon. Tre bone, bonege. Tiu ĉi bubo ja memoras. Ha! la Sankta Skribo diras: « Kaj oni semis grenojn en la teron; kaj kie la

tero estis mortinta, la grenoj ne elĝermiĝis, — sed kie la tero estis viviga, la grenoj elĝermiĝis... » La prudento de Petko do ne estas mortinta tero, ĉar jen la grenoj elĝermiĝis, li ja memoras.

— Kio estas la paradizo?

— Ĉielo.

— Kie ĝi estas?

— Tie...

— Bonege; ĝi estas super la nuboj. Neniam forgesu tion ĉi, mia filo, kaj timu ĝian potencon.

— Mi timas.

— Ĉiu kristano timas ĝin. Ci estas kristano, mi ankaŭ, kaj je ĝia potenco humile mi klinas mian kapon.

— Mi klinas mian kapon.

— Dio gardas nin ĉiujn, mia filo, — diris la pastro, kaj post kelksekunda paŭzo li faligis siajn brakojn kaj plengorĝe kriis al la knabo:

— Timu Dion, ho peka homa estaĵo ci! Tremu!

La knabo tremis. En lia cerbo senorde zigzagis la aŭditaj vortoj, el kiuj li memoris nur la lastan, ĉar ĉiu noveaŭdita vorto forigis el ĝi la antaŭe aŭditan.

La pastro estis kontenta. Jen la bubo timas, li tremas, lia prudento okulvideble elĝermigas la grenon.

— Ni daŭrigu. Diru nun al mi, sencerba homa fuŝkreitaĵo, kiu estas cia patro? Ho! ni haltu ĉe tiu ĉi demando! ci ja ne scias tion. Ci naskiĝis sekve de peka ago; la edzino de nia iama sonorigisto edukis cin por la bagatela sumo de dek ses kronoj ĉiumonate, dum ŝi vivis la bonkorulino. Eble ia nobela fraŭlino estas cia patrino, kaj — kiu scias, kiu estas cia patro... Hm... malagrabla... malagrabla... Antaŭ dekdu jaroj

oni alportis cin tien ĉi, en tiun ĉi mizeran vilaĝon, ke tie ĉi ci pereigu. Ci estis tiam nur dekmonata, malgranda vermeto. Jes, ci ricevis multe da batoj, oni ofte malsatigis cin, cin, sencerba skarabido, sed ci...

La pastro ridetis.

— Aŭskultu min kaj ne tusu.

La knabo premis siajn manojn al la brusto kaj senkuraĝe balbutis:

— Tie ĉi doloras... tie ĉi...

— Doloras? Kredeble ci malvarmumis, sentaŭgulo! Kial ci vagas nudpiede? kial ci ne restas trankvile en cia ĉambro?

Li tiris al si la knabon kaj palpis lian bruston. Ĝemis la malsana brusto, kaj rapide batis la sango en liaj bluaj, maldikaj vejnoj. Kun larmoplenaj okuloj li rigardis la pastron, kiu malkontente balancis sian kapon.

— Iru en cian ĉambron kaj kuŝigu. Preĝu, ke Dio sendu al ci feliĉigan resaniĝon. Foriru do.

La knabo foriris.

— Hm! — murmuris poste ĉagrene la pastro, — povas okazi, ke tiu ĉi bestido mortos ĉe mi. Per lia morto li kaŭzos al mi superflujajn elspezojn... Ho, Dio, Sankta Sinjoro, kiu ĉion vidas kaj punas la punindulojn, vidu kaj severe punu tiujn senkorajn gepatrojn, kiuj forĵetas de si la idon; kiuj pli abomenaj estas ol lupinoj, hundinoj; kiuj ne timas Vian terurigan koleron; kiuj tiel ŝarĝis mian modestan budĝeton...

Ekstere varme brilis la suno, papilioj flirtis de floro al floro, birdoj pepadis. Ekstere la kampoj disvastigas bonodoron, koturno petolas laŭtakrie inter la tritikoj; ĉio vivas, ĉio estas feliĉa, invitanta al amo.

Ekstere la infano disetendis siajn brakojn kaj plenkulme li ĝuis la dolĉan aeron. Poste li iris en sian ĉambron, kovris sin per siaj malnovaj ĉifonoj kaj kuŝiĝis por dormi.

Vespere la kuiristino, la maljuna Mario, iris al la paroĥestro:

— Ĝemegas la knabo.

— Kompatu lin, Mario, li estas malfeliĉa.

— Bone, bone, mi kompatas; mi diras nur, ke li ĝemegas.

— Lasu vidi al mi la kompatindulon.

Ili kune iris en la ĉambron de l' knabo, kie li kuŝis kun kapo apogita sur brako. Liajn malgrasajn vangojn superŝutis ia mortiga febro, liaj lipoj tremis, ili estis sekaj, varmegaj. La pastro rigardis lin staranta sur la sojlo.

— Grava afero... Iru al la veterinaro, venigu lin; li ja konas la malsanojn. Iru, Mario.

— Kial?

— Ĉu vi ne aŭdis? — kriis la paroĥestro malfable, minacante ŝin per liaj fortikaj, ostoriĉaj pugnoj.

— Idiota maljunulino!

Mario murmure foriris; ŝi sciis, ke ne estas konsilinda malobei al ŝia mastro, kiam li koleras.

La pastro eliris sur la korton kaj tie li promenadis. Li rigardis la rubmonteton, sed li ne vidis ĝin. Li ankaŭ ne vidis la anserajn plumojn, disĵetitajn sur la korto. Li meditis. — Sed li ekvidis tiun altan, brunan ŝtonon en la enterigejo, apud kiu la knabo kutimis ripozi ĉiuposttagmeze.

— Senpage mi donos al li la lokon...

Kaj li kontentiĝis. Li ne postulos eĉ unu groŝon, ĉar li estas bonfarulo, helpemulo, — li estas tia, kia decas esti la servanto de Dio...

* * *

Estis jam vespero, kiam la kaleŝo de Paŭlo Katolnai atingis la dometon de l' kampogardisto. Aŭdinte la bruon, la gardisto eliris el la dometo kun delevita ĉapo, humile salutante sinjoron Katolnai, kiu rapide eniris la dometon.

— De kiam ŝi estas tie ĉi? — demandis li.

— Hieraŭ ŝi venis, — respondis la kampogardisto.
— Malsane ŝi piediris, kaj kiam ŝi preteriris tie ĉi, ŝiaj piedoj apenaŭ povis ŝin porti. Mi do invitis ŝin ĉe min, kaj proponis al ŝi kuŝiĝi.

— Mi dankas, Jozefo, mi dankas...

Paŭlo etendis al li sian manon, sed la gardisto embarase paŝis posten; li nenion komprenis. La alt-ranga sinjoro, al kiu apartenas ĉio ĉirkaŭvidebla en tiu ĉi regiono, proponas manpremon al li, al simpla, malriĉa vilaĝano... Sankta Dio! io okazis. La malriĉulo akceptas la manon, sed anstataŭ premi li humile kisas ĝin. Delikata, forta mano, sed ĝi estas malvarma, tremanta.

Jozefo paŝis posten kaj estimoplene atendis. Paŭlo klinis sin pli proksimen al la vilaĝano:

— Ĉu ŝi sola venis?

— Jes.

— Nun lasu min sola.

Paŭlo restis sola. Li karesis sian frunton per siaj malvarmaj fingroj, poste li eniris en la ĉambron, refermante la pordon post si. Ĉe la fenestro, malsana knabino kuŝis sur la lito. Aŭdinte la bruon de la malfermiĝanta pordo, ŝi turnis sin en la lito kaj ridete rigardis Paŭlon per siaj nigraj, grandaj okuloj. Paŭlo surgenuis apud la lito kaj kaŝis sian vizaĝon en la manojn.

— Zoe!...

— Vi alvenis! — diris mallaŭte la knabino. — Vidu min, Paŭlo, vidu min. Vi ja ne vidos min longtempe.

Paŭlo ekscite kaptis la manon de la knabino:

— Ne! ne diru! Zoe!

La knabino lace ridetis. Ŝia klara, blanka vizaĝo ne estis rigida, sed dolĉa, kiel tiu de anĝelo. Kvazaŭ lumo ĉirkaŭus ŝian frunton, kvazaŭ en tiu ĉi momento ŝi ne sentus plu tiun senliman nokton, kiu ŝin tentas super ŝia lito en la malluma aero.

Ŝi prenis la manon de Paŭlo kaj tiris ĝin al sia brusto.

— Aŭskultu min, Paŭlo. Jam de longa tempo mi estas malsana. Mi sentas, ke mi ne vivos longe; tamen mi ne pensis, ke tiel baldaŭ... Ne, ne interrompu min, Paŭlo... ne nun, — nun aŭskultu. Mi intencis skribi al vi, mi volis sciigi vin, kie estas nia filo, sed mia patro ne permesis ĝin. Mia patro ankaŭ estas tiel kruelkora, kiel la via.

— Mia patro jam mortis, Zoe...

— Ĉu li trankvile mortis? Ho, jes — jes... Ĉu li sciis, kion li faris? Ĉu la malbona knabo scias, ke mortas la birdido, se li tropremas ĝian malfortan

bruston?... Mi volis skribi al vi, Paŭlo, sed mi ne povis. Mia patro neniam lasis min sola. Li gardis kaj observigis min. Li riproĉadas min pro la estinteco. Li krie diras al mi, ke vi denove per mono pagos al mi por la...

— Zoe!...

— Ne vi, Paŭlo, mi scias, ke ne vi. Vi ja amis min, vi, mia amo, mia vivo, vi, mia ĉio! Ne vi faris tion, sed via patro — ho! — li faris tion, kruele, senkompatate. Kial ja kompati al mi, malfeliĉa hebreino! Vi ne sciis pri tiu ago de via patro. Ho, mi jam konas la okazintaĵojn, kaj mi ne plendas kontraŭ vi, kaj mi ne plendas plu kontraŭ via patro. Iam post iam mi eble forgesos ĉion. Jes, mi baldaŭ forgesos ĉion, Paŭlo.

La knabino sidiĝis en la lito.

— Nian filon, — ŝi daŭrigis, — mi transdonis al la sonorigisto en vilaĝo Krizba. Jam de longa tempo li estas tie. Nun, kiam mi sentas mian baldaŭan morton, mi deziras lin vidi ankoraŭ unu fojon. Mi petis mian patron pri tio, sed li, la sensentema maljunulo, rifuzis min. Li petis de Jehovah morton al mia filo, kaj nomis lin malhonestulo... Hieraŭ frumatene mi do foriris de hejme, piede, sed mi jam ne povas plu daŭrigi la vojaĝon.

Ŝi kaptis la manon de Paŭlo kaj kun espora rideto rigardis lin per siaj brilantaj okuloj.

— Mi fidas al vi, Paŭlo. Iru, prenu nian filon al vi, kaj amu lin, Paŭlo, amu... Diru, ĉu vi amos mian malfeliĉan filon, vian filon... la nian...

— Jes, Zoe, mi amos lin, plie ol mian vivon. Morgaŭ mi iros por li...

— Dankon, dankon al vi, Paŭlo, — ŝi diris kon-

tente. Poste ŝi rekuŝiĝis sur la kusenon kaj fermis siajn okulojn. — Mi estas laca.

— Vi, sanktulino!

— Kiel bona vi estas, Paŭlo. Vi venis ĉe min, kaj vidu, mi ankaŭ pensis pri vi. Jen estas via portreto, jen viaj leteroj. Kun malespero mi prenis ilin, ke mi povu vidi ilin ankoraŭ unu fojon, kaj nun — mia Dio — nun mi sentas min feliĉa kaj sana. Kredu, ke ĉio reboniĝos ankoraŭ. Kiam oni aŭdos sur la kampoj la gajajn kantojn de l' rikoltistoj, mi estos resaniĝinta. Mi ne estos malforta, sed forta kaj bela.

Ekstere trankvila, kvieta vespero estas. Oni sonorigas ie, kaj estas aŭdebla la grinceta zumado de diversaj skaraboj sur la kampo.

Ĉio estas silenta. Sed Zoe jen levas sian kapon kaj altiras Paŭlon al si. Time ŝi demandas:

— Ĉu vi ne aŭdas ion?

— Nenion, Zoe.

— Oni sonorigas...

— Por la vesperpreĝo, mia kara, en la vilaĝo.

— Por preĝo... — ŝi murmuris malĝoje kaj kunmetis siajn manojn. — Dio vidas ĉion.

El malproksime oni aŭdas la sonon de fluto pastista kaj de bojo. Paŭlo preme tenas la varman manon de l' malsanulino, kaj li volas pensi pri nenio. Li ne scias, ne estas kapabla... Ĉio doloras en li, ĉirkaŭ lia koro; lia kapo estas laca, kaj antaŭ liaj okuloj miliono da mallumaj fajreroj dancas; sed li ne povas kapti eĉ unu el tiuj malklaraj pensoj, kiuj amasege atakas lian cerbon.

Li estas certa nur pri tio, ke Zoe mortos sen ia provo de helpo. La distrikta kuracisto loĝas en mal-

proksimeco atingebla dum duonhoro kaleŝe, li nepre devas venigi lin. Sed kiun li sendu al li? Ha! la kampo-gardiston.

Senbrue li malfermas la pordon kaj diras al la gardisto :

— Jozefo!

— Jen mi estas.

— Iru tuj al la sinjoro kuracisto, kaj diru al li, ke li tuj venu tien ĉi. Sidiĝu en mian kaleŝon kaj rapidu. Rapidegu!

— Jes, mi obeas.

La gardisto ensidiĝis la kaleŝon, Stefano ekmarŝigis la ĉevalojn, kiuj komencis rapide kuri.

Zoe ekaŭdinta la bruon de l' kaleŝo, lace malfermas siajn okulojn.

— Kie vi estas, Paŭlo?

— Tie ĉi, Zoe, apud vi.

— Tiel malklare mi vidas. Donu vian manon, Paŭlo. Malvarma ĝi estas. Vidu, miaj manoj estas varmaj, kaj varmega estas mia frunto. Kaj — mi ne scias, kie — eble tie ĉi — tiel malvarme estas.

Si prenis lian manon kaj premis ĝin al sia vango:

— Ĉu vi sentas ĝin?

— La febro kaŭzas tion, mia kara Zoe. Mi atendas la kuraciston tre baldaŭ venontan, li helpos al vi. Post unu horo li alvenos. Ĉu vi bone kuŝas, Zoe?

— Bone, nur mia kuseno...

— Mi tuj rebonigos ĝin. Ĉu mi ekbruligu kandelon?

— Estas ja lume, Paŭlo. Mi sentas la sunradiojn ludantajn sur mia frunto, mi vidas la florojn sur la

kampo, mi aŭdas la pepadon de l' alaŭdo. Baldaŭ mi estos gaja, kaj baldaŭ mi rebeliĝos.

Jen ŝi sidiĝis en sia lito kaj kovris siajn okulojn per la manoj, terurige ekkriante:

— Mia filo... Paŭlo!...

— Zoe, ho Dio!

— Mia filo mortas... tie...

Paŭlo delikate ĉirkaŭprenas la korpon de la knabino kaj rekuŝigas ĝin. Li konsolas ŝin: ŝi estu trankvila, ŝi ja nenion vidas. Aero ĝi estas, nenio. Sed ho! abomenaj ombroj dancas en tiu aero, kiuj jen etendas al ŝi siajn brakojn. For! Ne tentu, malbenita fantomo! ne etendu viajn ungegojn el la infero; ne flirtu, vi nigra birdo! Paŭlo ja zorge ŝirmas kontraŭ vi tiun kompatindan, malfeliĉan virinon, kiu amas lin kun febra pasio kvazaŭ frenezulino, kiu jen tie ĉi kuŝas nun velkinte. For, for de tie ĉi!

Paŭlo ne estas kapabla kriegi pro la doloro, kiu streĉas disen lian koron. Se li povus kapti iun, se li povus puni iun pro tiu ĉi perdiĝanta vivo, kiu jen ruiniĝas malrapide, ruiniĝas per teruriga malrapideco, kies premegan sufokon li sentas, — ho, se li povus puni tiun homon: li tuj mortigus lin kruele, li sufokus lin per unu sola premego de mano, — sed neniu, neniu, neniu estas! Francisko Katolnai Grizharulo! vi, kiu nun trankvile dormas en via malluma luksa tombo, reviviĝu, alvenu, vidu Zoe'n, kiun vi mizerigis, kiun vi mortigis; alvenu kaj vidu vian filon, kiu terure suferas la sekvojn de tiu kruela kondamno, kiun vi elpensis, vi verkis, vi efektivigis, vi, frenezulo!... Vi! vi!... Perforte kaj obstine vi kolektis la mallumaĵojn de l' societo, kiuj embriiĝintaj en la mallumaĵoj de

Ĝi antaŭjuĝoj, sin enŝovas inter la korojn, por detrui per malsanktaj manoj la ligojn, kiujn la sankta volo de Dio: la *amo* kreis, por ke Li efektivigu per ĝi la eternecon!... Alvenu, kruelulo, el via tombo, kaj vidu, kian rezultaton atingis via laboro, kaj ploru, ĉar via filo ne povas plori, — li, kiun vi trompis!

Paŭlo klinis sin super Zoe.

— Si dormas, — li murmuretis.

Li eliris el la ĉambro kaj apogis sin al la pordo.

La luno ĵus leviĝis. Tremis ĝia lumo sur la rosaj herboj kaj ĝi respeguliĝis de la vitreroj kaj aliaj similaj ruboj disĵetitaj sur la kampo. Paŭlo kun disigitaj lipoj ĝuis la freŝan aeron kaj premis al la pordingo sian frunton. Sed li ne vidis la herbojn rosajn, ne aŭdis la sonon de la fluto perludanta melanĥolian slovakon arion, — li aŭdis nur el la proksima arbaro la krion de strigo, birdo antaŭdiranta baldaŭan morton.

For, for, nigra birdo, for!

... Sur la vojo kaleŝo simpla alproksimiĝas. Paŭlo atente rigardas ĝin. La kuracisto... Ne, li alvenos per la luksa kaleŝo; — ĝi estas verŝajne fremda kaleŝo.

Rapide ĝi alproksimiĝas kaj haltas preter la dometo. Paŭlo rekonas sian propran ĉaskaleŝon, kaj rekonas la kolonelon, kiu jen elkaleŝiĝas.

— Mi venis, Paŭlo.

Ili reciproke premas manojn.

— Lidio sendis min.

Paŭlo indiferente movas sian ŝultron.

— Bone. Kion ŝi volas? Ĉu ŝi embuskas? aŭ ŝi volas min revenigi?

— Si sendis, ke mi vidu vin. Sed mi ne venis tial ke ŝi deziris, sed mi venis pro mia propra volo. Mi kompatas al vi, kara Paŭlo, serioze...

— Mi dankas, kolonelo.

Paŭlo proponis al li sidiĝon sur la ligna benko.

— Mi ne povas vin konduki en la ĉambro, kolonelo. Nur unu ĉambro estas en la domo, kie Zoe dormas. Vi ne scias, kiu estas Zoe.

— Ne, kaj mi ne esploras ĝin. Mi kompatas al ŝi kaj volonte mi helpus, se mi povus. Ĉu oni povus helpi ankoraŭ?

— La kuracisto baldaŭ venos. Li diros la certon.

— Vi estas laca, Paŭlo.

— Jes, mi estas tia. Kion volas mia edzino?

— Nenion. Morgaŭ ŝi vojaĝos en la urbon.

— Mi scias; ŝi diris al mi, ke mi iru.

— Ĉu vi iros?

— Ne, mi restos tie ĉi. Zoe estas malsana. Mia edzino iru, se ŝi volas, kaj faru tion, kion ŝi volas. Ŝi deziras eksedziĝi; ŝi do faru ĝin rapide. Mi jam nenion deziras. Morgaŭ mi elmigros, ien...

La maljuna sinjoro montris al la ĉambro:

— Kune kun ŝi?

— Jes, — respondis Paŭlo trankvile, kaj li sentis, ke nova forto eniĝas en lian korpon pro tiu ĉi ideo. Kune kun ŝi... kun la kompatinda, kun la malfeliĉa Zoe, kies vivon oni jam ne povas plu repostuli de Francisko Katolnai la Grizharulo, ĉar li dormas eternan dormon en sia luksa tombo, — li, kiu ne scias, kiajn malbenajn laborojn faris per li la mallumaĵoj de l' societo.

— Mi pensas, — daŭrigis Paŭlo post kelka paŭzo, montranta al la direkto de sia kastelo, — mi pensas, ke mi plu ne reiros tien...

— Neeble! — respondis la maljunulo. — Pri-pensu, ke vi havas devojn al via edzino, al via nomo; kaj la mondo...

— La mondo! — interrompis Paŭlo, levante sian kapon kun maldolĉa malestimo sur la lipoj. — La « mondo »! La decreguloj! la hipokrito, kiu estas deviga por la homoj... ho!... mi scias, mi scias, kaj mi ne kulpigas vin, kolonelo! Vi estas homo honesta, sincera, sed vi ne sentis la premon de la « mondo », vi ne portadis la maskon de la societo, kiel mi, kaj vi ne vekriis sekrete pro la doloro, kiel mi; mi, kiu devis kaŝi mian malfeliĉon, kiel la hundo kaŝas sian malsanon, por ke ne vidu ĝin tiu ĉi bona, tiu ĉi honesta, tiu ĉi decoplana « mondo »...

Kvazaŭ estus subite elfendiĝinta la ĉirkaŭkorpajo de lia animo, li daŭrigis kun fulmantaj okuloj, kun tremanta tono, klinante sin al la kolonelo, kiu mirante lin aŭskultis :

— Kion sciis pri mi la « mondo »? kion pri miaj doloroj, pri miaj ĉagrenoj, kiuj venenis mian sangon! Kion sciis la « mondo » pri tiu abomena perfido, kiun mia propra patro faris kontraŭ mi! Kial do ne venis helpi al mi tiam la « mondo »? kial do ĝi ne akcelis malhelpi la friponaĵon?... per kio kompensos min la « mondo » por miaj forrabitaj jaroj, por mia detruita vivo, — kaj per kio kompensos la « mondo » tiun ĉi malfeliĉan knabinon, Zoe'n, tiun ĉi sanktulinon, kiu ploregis kaj vane petegis por kompato, kiun trompis mia patro, jes, la mia !... Ho, redonu do al ni la

« mondo » la forrabitajn jarojn, ĝi kompensu nin por la kordoloroj, por la malfeliĉoj, kaj ĝi kredigu al mi, ke la patro rajtas trompi, perfidi sian filon, ke mi estas devigebla suferi la sekvojn de tiaj agoj, kaj ke ĉio tio ĉi estas saĝe, konvene, bone, honeste farita!...

— Paŭlo, trankviliĝu, — diris la kolonelo. — Mi ja nenion komprenas el tiuj paroloj, kiujn vi diras al mi.

— Kial kompreni? Jam malfrue. Mi petas vin, kolonelo, kiam vi reiros al mia edzino, diru al ŝi, ke ŝi komencigu la eksedziĝan proceson kontraŭ mi; mi ĉion konsentos jam antaŭe.

— Eble vi mem venus.

— Ne, mi ne iros. Mi restos tie ĉi kun Zoe, kaj morgaŭ mi veturos en vilaĝon Krizba, por serĉi mian filon.

— Vian filon?... kiel... do...

— Vi miras?

— Ne, mi ne miras, — respondis la kolonelo, — mi jam komprenas.

Paŭlo neige skuis sian kapon.

— Ne, vi ne komprenas, kolonelo. Sed mi volas, ke vi komprenu. Sciiĝu pri ĉio, kaj poste juĝu klare. Ankaŭ rakontu ĝin al mia edzino, se vi volas; se vi ne volas, ne rakontu. Al mi estas egale. Mi estas jam indiferenta pri ĉio, kio estas ekster mi.

Paŭlo sidiĝis apud la kolonelo.

— Juna mi estis ankoraŭ, kiam mi konatiĝis kun Zoe, kiu estas hebreino.

— Ha!

— Vi « ha »-as. Vi ankaŭ. Mi komprenas vin. La « mondo », la antaŭjuĝoj, la estimindaj limoj, la

obeindaj bariloj, starigitaj de la societo! Tiaj vi estas ĉiuj; tia estis ankaŭ mia patro. Sed, vidu klare, mi tion volas. Aŭskultu min, mi tuj finos. Ĝi estas simpla historio. Oni ofte aŭdas tiaspecajn historiojn, — kaj oni opinias, ke ili ne estas interesaj; sed pri tiuj, kiuj estas la herooj de tiaj historioj, la mondo malmulte scias, ĝi restas indiferenta al ili. Aŭskultu, poste juĝu je mi. — Mi jam ne memoras detale, kiel ĝi okazis. Mi amis Zoe'n, kaj ŝi amis min. Timema infano ŝi estis, kiun oni povis terurigi per neafabla, laŭtega vorto, kaj kiu nenion sciis pri via decema mondo. Jes, pri la « mondo », kiu nepardoneble kondamnas pro la plej malgranda kulpeto, se ĝi estas publike farita, — sed preterrigardas, ignoras, pardonas eĉ pro la plej granda krimo, se ĝi estas zorge kaŝita... Sed mi ne intencas nun prediki al vi pri tiuj ĉi eluzitaj frazoj, kiuj tedas vin, sed doloras al mi, ĉar malespero pelas ilin sur miajn lipojn. Mi volas nur diri, ke, kontraŭ malpermeso de mia patro, mi daŭrigis la interligitecon kun Zoe, ĉar ni pasie amis unu la alian.

Paŭlo kolere frapis la teron per sia piedo.

— Mia patro diris al mi, ke li ne toleras hebreinon. Li ne toleras Zoe'n. Zoe estas malhonesto, malĉasta... Tio sufiĉis al mi. Tiu ĉi vorto kaŭzis al mi pli akran doloron, ol kaŭzus batoj per vipo.

— Senpripense li parolis, mi serioze diras...

— Ĉu vi kredas? Ne, sinjoro, ne; mia patro tre bone sciis, kion li faras, sed li malbone kalkulis kaj — malfrue. Aŭskultu. Unu tagon la patro de Zoe skribis leteron al mi. Leteron, en kiu li petas min, ke mi redonu la bonfamon al lia filino, ke mi donu nomon al Zoe kaj al ŝia infano, kiu infano estas ankaŭ la mia.

Tiun leteron, sen mia antaŭa scio, mia patro defraŭdis, kaj li en mia nomo — — —

Paŭlo ekkaptis la manon de l' kolonelo kaj ĝemege daŭrigis :

— En mia nomo li monon sendis al Zoe... monon... monon...

— Paŭlo, mia Paŭlo...

— Monon, monon, en mia nomo! Ho, kie estis tiam la « mondo »! kial ĝi ne venis por malhelpi tiun teruran friponaĵon, tiun krimon, kiu elvokas venĝon ĉielan, tiun krimegon, per kiu mia patro, mia propra patro fosis tombon por mia honesteco, por mia feliĉo!... La patro de Zoe resendis la monon, kaj la sekvintan tagon mi vane serĉis ilin. Ili malaperis, forlasis la vilaĝon kaj dum du jaroj mi nenion aŭdis pri la maljuna Lazaro kaj lia filino. Pro miaj malsukcesaj esploroj por ili mi falis en malesperan indiferentecon. Mi interesiĝis pri nenio plu. Nur kelkfoje kaptis min kolero kontraŭ la tuta mondo, kaj tiam mi kulpigis en mia spirito Zoe'n, mi provis kredigi al mi, ke ŝi neniam amis min, ke ŝi volas sin liberigi de mi por ĉiam, kaj ŝi forŝtelas nian filon kaj kaŝas lin ien. En tiu tempo mi konatiĝis kun vi, kolonelo, kaj kun Lidio. Mia patro instigis min al edziĝo, kaj mi obeis. Kial ne? Se Zoe povas vivi sen mi, mi ankaŭ povos vivi sen ŝi. Laŭ ordono de mia patro mi edziĝis je Lidio.

— Mi nenion sciis pri la ĵus rakontitaj aferoj, — murmuris la maljuna sinjoro.

— Duonjaron post mia edziĝo mi renkontis Zoe'n en la urbo. Pala ŝi estis kaj serioza, ne la konita Zoe plu. Ŝi jam ĉion sciis pri mi, kaj ŝi sciigis min pri si. Sed estis jam malfrue, — mia Dio! — jam tre malfrue!

Mi volis tuj eksedziĝi de mia edzino, sed Zoe ne permesis tion. Ŝia patro — diris Zoe — neniam konsentus, ke mi edziĝu je lia filino; li diris, ke mi estas voluptulo, trompisto, mensogulo, kiu denove proponos monon por kompensi la moralan faligon. Vane mi petegis lin, ke li aŭskultu min: li malakceptis, forpelis min. Poste mi demandis Zoe'n pri nia filo; ŝi respondis, ke li estas en bona loko, — sed ŝi ne diris, kie li estas. Kaj mi ne havis kuraĝon, postuli lin. Poste ni adiaŭis. Malĝoja adiaŭo ĝi estis, sinjoro. Kompatinda Zoe... ŝi ne ploris, ŝi estis serioza kaj trankvila. Kaj kiam ni forlasis unu la alian, mia koro pleniĝis je malvarmo, je senlima malespero; sed tiu persono, al kiu mi estus povinta riproĉi pro mia forŝtelita vivo, tiam jam ne vivis. Mia patro mortis du monatojn antaŭ tiu renkonto. — Malĝoja historio estas tio ĉi, ĉu ne vere?

La kolonelo mute premis la manon de Paŭlo. Paŭlo daŭrigis:

— Vane mi skribis al Zoe leterojn: ili nemalfermite resenditaj estis al mi. La maljuna Lazaro zorge gardis sian filinon; ŝi absolute ne povis skribi al mi. Eble, ŝi eĉ ne volis. Eble la skribo estus kaŭzinta ankaŭ al ŝi kordoloron. Poste mi ankaŭ ne skribis. Rezigne mi provis kontentiĝi je mia sorto, kaj mi konsolis min per similaj historioj de aliaj, pri kiuj la « mondo » tiel ne scias, kiel ĝi ne scias pri miaj turmentiĝoj, — aŭ, se ĝi eĉ scias, ĝi trovas ilin tiel simplaj kaj nerimarkindaj, kiel la miajn.

Paŭlo restariĝis kaj demandis la kolonelon:

— Ĉu vi kondamnas min?

La maljuna sinjoro ankaŭ restariĝis kaj forte

premis la manon de Paŭlo. Li respondis per unu sola vorteto :

— Ne.

Sur la landvojo alproksimiĝis la kaleŝo de Paŭlo, per rapida troto. Paŭlo nerve prenis la kuraciston je brako kaj rapide enkondukis lin en la dometon de l' kampogardisto.

Piedfingre ili iris en la ĉambron.

* — Bruligu kandelon, — diris mallaŭte la kuracisto.

Paŭlo proksimiĝis al la lito kun la brulanta kandelilo.

— Si dormas, -- li diris al la kuracisto, kiu palpis la manon de Zoe, kaj ŝetinte unu rigardon sur ŝian dolĉan, blankan vizaĝon, sin turnis al Paŭlo :

— Si mortis, — li respondis serioze.

*

Ne volu sciiĝi pri la doloro, kiu, se enmordas la koron, ne degelas en larmoj. Ne volu sciiĝi pri tiuj mutaj turmentoj, kiuj kunpremas la cerbon kaj plenversas ĝin per sango tiel, ke ĝi preskaŭ disfalas pro la premanta doloro.

Paŭlo ne ploris ĉe la enterigo de Zoe. Oni jam enterigis ŝian ĉerkon, sed eĉ unu guto da larmo ne aperis en liaj okuloj, eĉ unu plenda vorto sur liaj lipoj.

Reirante li ne akceptis la proponitan brakon de la kolonelo. Li marŝos senapoge. Li ne estas malforta, li estas trankvila. Li estas kontenta, ĉio bone okazis. Tre bone estas, ke Zoe mortis; ŝi ja ne suferos plu... tre bone...

La maljuna sinjoro maltrankvile esploris lian vizaĝon kaj sekrete balancis sian kapon.

En la dometo de l' kampogardisto Paŭlo rigide adiaŭis de la kolonelo. Li vojaĝos en la najbaran vilaĝon. Tie estas lia filo, li serĉos sian filon.

— Ĝis la revido, kolonelo.

— Mi iros kun vi, se vi konsentos, — respondis la maljunulo.

— Dankon al vi!

Frumatene ili ekvojaĝis. La kampogardisto kun delevita ĉapo deziris feliĉan vojaĝon al la sinjoroj, kaj instruis la veturigiston, Stefanon, ke li elektu la vojon dekstran, ĉar ĝi estas pli bona, ol la alia.

Post dek minutoj la kaleŝo malaperis en la arbaro. Kaj post unu horo alvenis el la kastelo alia kaleŝo, el kiu sinjorino Katolnai eliris. Ŝi estis ekscitita, kaj apenaŭ ŝi komprenis el la vortoriĉa raporto de l' kampogardisto, ke vere la sinjoroj estis tie ĉi, sed antaŭ unu horo ili forvojaĝis.

— Kien?

— En vilaĝon Krizba — sur tiu ĉi vojo.

Lidio residiĝis en la kaleŝon, la veturigisto ekvipis la ĉevalojn, kiuj facilmove tiris la veturilon sur la vojo al Krizba.

La bonanima vilaĝano skuetis siajn ŝultrojn.

— La sinjoroj pli rapide veturas. Stefano veturigas.

Kaj Stefano veturigis la kaleŝon tra herboj kaj arbetaĵetoj, ĉiam en rekta direkto.

Senviva, malĝoja pejzaĝo ĝi estas. Nudaj ŝtonegoj leviĝas el la flankoj de montoj, sur kiuj nur juniperoj povas vegeti, kaj kriplaj abioj kaj pinoj. Malgaje ili

klinas siajn malhelverdajn, maldensajn foliarojn, kvazaŭ ili dezirus forlasi siajn lokojn kaj transplantigi sur la randon de la vojo, sur kiu Stefano veturigas la luksan kaleŝon.

La sinjoroj ne vidas la pejzaĝon. Precipe Paŭlo, li nenion vidas. Li fermis siajn okulojn. Li estas profundiginta en siajn pensojn.

La kolonelo ankaŭ pensadas en la rekta angulo de la kaleŝo. Jen li kunpremas siajn pugnoj kaj dentojn, jen li ekscite prenas siajn lipharojn, jen li enfingras en la veluran sidilon de l' kaleŝo.

— Mi ne sciis, mi ne povis scii, — murmuris li mallaŭte.

Li sentis, ke li ne trovas la ĝustan rimedon de klareco. Paŭlo multe parolis, rapide parolis, kvazaŭ li volus per unu fojo elverŝi ĉiujn siajn dolorojn, ĉiujn siajn suferojn, — kaj tamen li multe preterlasis. Kaj la maljuna, fiera nobelulo, Francisko Katolnai la Grizharulo! Li ne komprenas, ne! Tio estas senhonestajo, friponajo, kondamnindaajo. Paŭlo estas prava. La moralreguloj de la societo estas malperfektaj, mallumaj, kriplaj, falsaj, absurdaj! La antaŭjuĝo de la societo estas krimo kontraŭ la Kreo, ĉar ĝi estingas la fajron, kiun la Kreinto bruligis en la homo koro, por ke Li konservu per ĝi la eternecon. La mallumaĵoj de la societo estas kondamnindaj atencoj kontraŭ la ĉiela fajro de l' amo, kiu estas la eterneco, la sankteco, la dieco mem.

Ne estas eble, ke Francisko Katolnai la Grizharulo trankvile povas dormi en sia tombo!

... Sed jen maloftiĝas la abioj, la juniperoj; kie altaj montoj etendiĝas al la ĉielo en kaprica senordeco,

sub la serioza Tatra, oni vidas pajlotegmentajn dometojn, jen ruĝajn, jen bluajn, kun randohavaj, malgrandaj fenestroj. Tiu ĉi vilaĝo estas Krizba, la vilaĝo de paroĥestro Petro Chrasztek.

Rubmontetoj en la kortoj, — malgrasaj brutoj blekas en muskaj staloj; hundoj bojas malvolonte al la kaleŝo alvenanta.

Paŭlo atente ĉirkaŭrigardas.

— Kien mi veturigu? — demandas Stefano, la veturigisto.

— En la pastrodomon.

Petro Chrasztek jam de malproksime ekvidis la veturilon. Neniam venis tia bela kaleŝo en tiun ĉi vilaĝon; li mem ne vidis tian dum la dek ses jaroj, kiujn li pasigis tie ĉi. Kaj jen, ĝi direktiĝas ĝuste al la pastrodomo.

Petro Chrasztek ordigas sian pastran veston kaj eliras sur la korton. Mario estas jam tie; miras, admiras la tuta servantaro.

La paroĥestro humile sin klinante akceptas la gastojn alvenantajn. Li salutas Paŭlon, kiun li persone konas, — kaj kun afablega rideto li sin klinas antaŭ la kolonelo, kiu ĵetas malŝatan rigardon sur lin; al la maljuna oficiro ne plaĉas tiu ĉi grasa, sensulka vizaĝo, — tiu ĉi sklavanima pastro.

En la ĉambro Paŭlo demandas :

— Ni serĉas unu knabon; eble vi, sinjoro paroĥestro, povus doni al ni ian sciigon.

— Jes, via sinjora moŝto, unu knabon; ordonu.

— Oni donis lin al la sonorigisto, antaŭ multaj jaroj. Li estas fremda knabo. Ĉu vi povus diri al mi, kie li estas?

Petro Chrasztek ronden malfermas siajn okulojn kaj embarase balbutas :

— Vi serĉas *tiun* knabon...

— Jes, tiun knabon. Mian filon.

— Ĉu li estas... la filo... de via... sinjora moŝto..

La paroĥestro stariĝis, malfermis la pordon de la najbara ĉambro, kie, en simpla ĉerko, malgrasa infano kuŝis mortinta. Kvar kandeloj ĵetis palan lumon al lia multe suferinta vizaĝo, sur kiu vidiĝas longedaŭrinta malsano.

— Tiu knabo... jen... estas tie ĉi...

Paŭlo, malfeliĉa —

Li alpaŝis al la ĉerko, rigardis la mortintan knabon rigide, longe, kaj kiam la kolonelo aliris apud lin, li ĝemege ekploris, ploris kortuŝante, ploregis pro la nekonsolebla doloro...

— Mia kara filo!... mortis...

— Hieraŭ tagmeze, — raportis plendatone la pastro kun manoj kunmetitaj. — Ni pasigis tutajn noktojn nedormantaj ĉe lia lito, mi kaj Mario; ĉu ne vere, Mario?

Paŭlo kisis la malvarmajn lipojn de la infano, poste reiris en la alian ĉambron.

— Lasu la pordon malfermita, — li petis mallaŭte.

— Li estis ĉiam malsanema, — klarigis la paroĥestro al la kolonelo, — sed prudenta, saĝa infano. Ni amis lin, kvazaŭ mian fraton. Ĉu ne vere, Mario? Du fojojn ni eĉ venigis kuraciston por li el la urbo; sed domaĝe, li ne estis kapabla forigi la mortigan malsanon, kiu lin atakis. Inter miaj brakoj li mortis.

Paŭlo nenion aŭdis el la mensogoj de Petro Chrasztek. Li rigardis la ĉerkon, la filon de Zoe, sian

propran filon, kiu neniam sentis la patran kareson, kiu neniam ĝuis la patrinan kison. Li ja vivis, kiel voj-randa malforta herbo, ruinigata de pli fortaj kreskaĵoj, de bestoj, de homoj... Ha! malbenan laboron faris tie ĉi, sur la tero, la mallumaĵoj de la societo, kaj ne estas eble, ke ekzistas Dio, se Francisko Katolnai la Grizharulo trankvile dormas en sia luksa tombo...

— Lasu nin solaj, — diris la kolonelo severe al la pastro. Poste li prenis la manon de Paŭlo kaj provis lin konsoli per simplaj, sed sinceraj vortoj:

— Nenion utilas la konsolo, mi scias, sed refortigu vin, Paŭlo, provu venki viajn malĝojajn sentojn.

En tiu momento senbrue malfermiĝis la pordo. Nova gasto alvenis: Lidio. — Rapide ŝi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, — ŝi ĵetis esploran rigardon al la ĉerko, poste al Paŭlo, — kaj ŝi ĉion komprenis. Ĉion tuj ekkomprenis, ĉion trasentis la *virino*.

La kolonelo alparolis ŝin malbonhumore:

— Vi venis, nevino...

— Mi alvenis, mia onklo, — respondis Lidio mallaŭte.

Paŭlo lace turnis sian kapon: jen estas lia edzino.

Kaj tiam la bela sinjorino aliris antaŭ Paŭlon; longe, profunde ŝi rigardis en liajn okulojn, poste ŝi ĉirkaŭprenis lin delikate per siaj brakoj kaj kisis lin longe, kore, amplene:

— Multe vi suferis, mia kara edzo...



EKSTRAKTO EL LA KATALOGO

DE

Presa Esperantista Societo

33, Rue Lacépède, PARIS

Literaturo.

L. MALFELIČULO. — <i>Sep Rakontoj</i>	1 fr.
H. SENTIS. — <i>Urso. — En Montoj</i>	1 50
D. DE ROTHAU. — <i>Du Rakontoj</i>	1 fr.
E. BOIRAC. — <i>Perdita kaj Retrovita</i>	0 60
H. DUNANT trad. de H. VAILLANT kaj P. FRUICIER. — <i>Rememoro pri Solferino</i>	1 25
E. DUCOMMUN, trad. VICTOR DUFEUTREL. — <i>La funda- mentoj de l'Pa.ifismo</i>	0 50
BERNARDIN DE ST-PIERRE, trad. H. HODLER. — <i>Paŭlo kaj Virginio</i>	1 25
MOLIÈRE, trad. V. DUFEUTREL. — <i>Edziĝo Kontraŭvola, Komedio ludita en la Boulogne'a kongreso</i>	0 60
CHATEAUBRIAND, trad. R. DESHAYS. — <i>La lasta Abence- raĝo</i>	0 60
J. JOUY, trad. P. CORRET (kun figuraĵo). — <i>La Benkoj de la Promenejo</i> (dua eldono)	0 20
LEONID ANDREJEV, trad. F. AVILOV. — <i>Ruĝa Rido.</i> OCTAVE MIRBEAU, trad. L. SEGRÉTINAT. — <i>Ili estis freneszaj</i>	1 50
GARŠIN, trad. de K. BOGUŠEVIČ. — <i>Ruĝa floro</i>	0 30
C. CHAVET. — <i>Grasa Lignaĵisto, firenza rakonto</i>	0 50
DE AMICIS, trad. ROSA JUNCK. — <i>Kverko kaj Floro</i> ..	1 50
ABONYI ÁRPÁD, trad. LENGYEL PÁL. — <i>Mallumaĵoj</i>	0 60
LENGYEL PÁL. — <i>Libro de l'Humoraĵo</i> (en represado).	
TH. CART. — <i>Trafendita Turo</i> (por la propagando inter la blinduloj)	0 25

F. ZAMENHOF. — <i>Homa Doloro</i> , originala poemo en Esperanto	0 30
D-RO NOEL. — <i>Rolandkanto</i> , verse trad.	1 50
S-INO VALLIENNE. — <i>La Gasto</i> , duakta komedieto, originala	0 50
EDGAR ALLAN POE, trad. ALEX. PRIDE. — <i>La Puto kaj la Pendolo</i> , Rakonto el la Hispana Inkvizicio....	0 30
FLORIAN, trad. BULTHUIS kaj TOUCHEBEUF. — <i>Du biletoj</i> .	0 40
PUŠKIN, trad. Vs. LOJKO. — <i>Mocart kaj Saljeri</i>	0 50

Scienco.

S. POLJANSKIJ. — <i>Kurioza Sunhorloĝo</i> , kun figuraĵoj, 2-a eldono	0 20
K. VERKS. — <i>Elementa fotografa Optiko</i>	1 25
LENGYEL PÁL. — <i>La Kalendaro</i>	0 30
G. T. FECHNER, trad. P. KADIK. — <i>Libreto pri transmorta vivo</i> (en presado).	
BOIRAC. — <i>Homa Radiado</i> , eksperimentoj magnetismaj	0 25

Muziko.

<i>La Vojo</i> , muziko 4-voĉa de R. DESHAYS laŭ la versaĵo de D-ro ZAMENHOF	0 30
<i>Ho! mia Kor'</i> , muziko de S-ino GUIVY	1 fr.
<i>En Songo</i> muziko de L. RIGOIR	0 75
<i>Kristnasko</i> , muziko de L. RIGOIR laŭ paroloj de TH. GAUTIER, tradukitaj de D-ro PHILIPPET	1 50
<i>Flugintaj Revoj</i> , muziko de PAUL WACHS laŭ versaĵo de A. GRABOWSKI	2 fr.
<i>La Pastro de Pompono</i> , gaja kanteto malnova, tradukita de G. CHAVET	1 fr.
<i>Le Congrès de Boulogne</i> , chanson humoristique de G. CHAVET, sur l'air du <i>Curé de Pomponne</i>	0 50
<i>Birdoj forflugu!</i> muziko de S-ino GUIVY, laŭ versaĵo de GUIDO GEZELLE	1 60

La Granda Vortaro Franca-Esperanta

DE LA

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

estas redaktata

kun la kunlaborado de diverslandaj Esperantistoj

Lingvistoj, Profesoroj, Literaturistoj, Inĝenieroj, Kuracistoj,
Tehnikistoj, Komercistoj, k. c.

sub la kontrolo


de la du plej malnovaj Esperantistaj gazetoj:

Lingvo Internacia

FONDITA EN 1895

kaj L'Espérantiste

FONDITA EN 1898



Tiu verko aperas en kajeroj kaj ĝi plena estos

du belegaj volumoj in 8°,

po 600 paĝoj proksimume.



SUBSKRIBA PREZO :

(gis la 1. oktobro 1907)

Kontante, 17 frankoj ; aŭ pagate en 3 partoj, 18 fr.,
en samlongaj templimoj, 6 fr. samtempe
kun la mendo, 6 fr. post 3 monatoj kaj 6 fr.
post 6 monatoj

kaj 30 frankoj post la 1-a de oktobro 1907.

Specimena kajero estas senpage ricevebla.

Lingvo Internacia

Centra Organo de la Esperantistoj

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895

ADMINISTRACIO :

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

En ĉiu numero : 48 paĝoj kaj 16-paĝa aldono literatura

En **Lingvo Internacia** troviĝas : seriozaj kaj fantaziaj artikoloj, poezioj, mallongaj artikoletoj kaj bagateloj, artikoloj pri Esperanto kaj pri lingvaj demandoj, kroniko pri la movado esperantista en la tuta mondo, bibliografio, analizo de la esperantistaj gazetoj, fako por korespondado, problemoj.

Ĝia **Literatura Aldono** enhavas pli longajn rakontojn kaj novelojn ; ĝi formas ĉiujare belan volumon 192-paĝan aparte bindeblan.

Jara abono :

Sen Literatura Aldono	5 fr. >
Kun Aldono	7 fr. 50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto


por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono : 2 fr. 50

ADMINISTRACIO : PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, rue Lacépède, PARIS

Specimena numero estas senpage ricevebla.

AB 1946.



~~~~~  
692.4-07. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.  
~~~~~